

Tombo

de Guillaume

du Bellay



Vidaĵo

sur la vitraloj

el la Sakristio



Muzikisto anĝelo

(fino de la 15a jarcento)







Vitralo de la Ĉieliro



Ĥorejo kaj la ambulatorio

# LE MANS

# LA KATEDRALO SANKTA JULIANO



## GEM

GROUPE ESPERANTO DU MAINE

06 84 53 85 44

Esperanto72gem@gmail.com

De preskaŭ 7000 jaroj, tiu loko estas sakrata kiel atestas tion la menhiro apud la katedralo. Tiu konstruaĵo estas vera « arkeologia katedralo », sintezo de la romanika stilo kaj de la diversaj gotikaj skoloj : ĝia konstruado etendiĝas de la 11a ĝis la 15a jarcento. Ĝi longas 137 metrojn, ĝia bazo ampleksas 5000 m² : ĝi estas do unu el la plej imponaj francaj katedraloj.

**1 LA REĜA PORTALO**

Tiu portalo havas la saman tipon kiel tiu de Ĉartro. Malkiel la tradicia plano de katedraloj, ĝi ne troviĝas je la ekstremo de la navo, sed nur ĉe unu el la flankoj, tiel ke ĝi situas fronte al la ĉefa strato de la mezepoka urbo, la Granda Strato .

**2 LA ROMANIKA FASADO**

(11a jarcento)

Tiu plata fasado karakteriziĝas per la sobreco de la ornamo uzanta la efikojn de la lumoj kaj de la ombroj de la geometriaj frisoj kaj la efekton de dam-tabulo de la frontono.

**3 LA ROMANIKA NAVO**

Ĝi longas 60 metrojn kaj altas 24 metrojn ; ĝi estis konstruita en la 11a jarcento. Post incendio kiu detruis ĝin, oni rekonstruis per ŝtonoj laŭ la Plantagenet-Stilo(*) Tiu stilo karakteriziĝas per kupolo-efekto, ĉiu volbo-ŝlosilo estis lokita pli alte ol la pinto de la kvar ĉef-solivaj arkoj kiuj enkadrigas ĝin.

(*) Stilo kiu venas de Normandio kun modluroj, kapiteloj, alternaj koloroj de la ŝtonoj.

**4 LA VITRALO DE LA ĈIELIRO**

Tiu vitralo estas unu el la plej antikvaj kiuj ankoraŭ lokiĝas en religia konstruaĵo (de la komenco de la 11a jarcento). La brilo de ĝiaj koloroj, la sobreco de ĝia ornamo, la ascenda movo de la gestoj kaj de la vestoj donas vivantan kaj modernan stilon al tiu admirinda verko de la vitrala arto.

**5 LA TRANSEPTA KRUCIĜO**

La transepto estis konstruita parte dank'al la malavareco de la reĝo Karlo la 6a kiu tiu maniere volis danki Sanktan Julianon. La sankta patrono de la urbo redonis al li spiritan serenecon post lia freneza krizo en arbaro de *le Mans*, la 5an de aŭgusto 1392. Oni atentu ĉefe la grandajn orgenojn de la Renesanca epoko, de *Simon Hayeneuve* (1529-1535), la grandan roz-vitralon (15a jarcento) kaj la du tapiŝojn Sankta Juliano (15a jarcento) ĉe la enirejo de la ĥorejo.

**6 LA KAPELO DE LA BAPTOFONTO**

Ĝi entenas tri kuŝostatuojn, el kiuj du estas gravaj verkoj de la Renesanco. La kuŝanta statuo de la grafo de la provinco *Maine* Karlo la 4a, frato de la reĝo *René*, estas verko de la italia skulptisto *Francesco Laurana* (fine de la 15a jarcento). La kuŝanta statuo de *Guillaume Du Bellay,* vicreĝo de Piemonto, estas verko de *Pierre Bontemps* (meze de la 16a jarcento)

**7 LA KAPELO DE LA SANKTA VIRGULINO**

Ĝi entenas gravegan verkon de la okcidenta mezepoka pentrarto : la ĉielkoncerto de la 47 muzikistaj anĝeloj (fine de la 14a jarcento). Tiu tutaĵo estas unika ankaŭ pro la prezentado de multaj muzikiloj de mezepoko, nun malaperintaj.

**8 LA ĤOREJO**

Ĝi altas 34 metrojn, kaj estas ĉirkaŭita per duobla absid-aleo kaj dek tri radiantaj kapeloj. Ĝi entenas, same kiel la ĥorejo de la Dipatrino de Ĉartro, la plej belan tutaĵon de la mezepokaj vitraloj.

**9 LA SAKRISTIO**

Ĝi montras la tuton de la dorsapoligoj de ĥorej-seĝoj (1576) kiuj montras la vivon de Kristo. Ili apartenas al la sama grupo kiel la seĝoj ĉirkaŭantaj la ĥorejon.

**LA MEBLARO**

La murtapiŝoj (15a jarcento)

- La legendo de Sankta Juliano kaj 5 tapiŝoj kiuj prezentas la vivon de sanktaj *Gervais* kaj *Protais*.
- La ĉiela koncerto de la 47 muzikistaj anĝeloj

La tombo-monumentoj

- Karlo la 4a
- Guillaume du Bellay
- Kardinalo Grente

La orgenoj

Tiu tubar-meblo estas unu el la plej grandiozaj de la Renesanco.

Ĝi konsistas el 66 tubaroj, 4 klavaroj kaj 4500 tuboj.

La vitraloj

- la vitralo de sankta Stefano kaj tiu de la Ĉieliro
- 13 fenestroj montrantaj alt-staturajn personojn : sanktuloj, episkopoj…
- tutaĵo da vitraloj rakontantaj la vivon kaj miraklojn de la Virgulino Maria
- « *la verko de la reĝo* » kaj la rozvitralo

La ĥorej-seĝoj

La dorsapoligoj prezentas la vivon de Kristo.

